Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵa Letero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**
NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

auto 7/05/2012 Kvardeksesa Eldono 2012 07/04/2012 SENDITA

Tiu ĉi letero havas "hiperligilojn" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, informojn al Roger rspring@tpg.com.au; kaj kopiojn al Ivan ivan@melburno.org.au;

La Informa kaj noma paĝoj nur aperos je la dekaj kaj dekkvinaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ (se erara, informu min. rspring@tpg.com.au)

Esperanto havos 125 jarojn je 26a Julio, 2012

La AEA-jarkongreso okazos en Brisbane 28 septembro ĝis 1 oktobro 2012,
La AEA-somerkursaro en Sidnejo estos 11 ĝis 28 januaro 2013.
Jonathan Cooper prelegos pri "Moderna arto": 26 majo 2ptm Esperanto Domo, Redfern

E-Vintro-Evento okazos en Adelajdo kaj apuda Sheidow Park Ŝtat-Lernejo ekde la vespero de vendredo la 8a ĝis la vespero de lundo la 11a de junio 2011 (la naskiĝdatreveno de la Reĝino)

Esperanta Retradio Grupo Esperantista Bilbao



Anton Oberndorfer faris retpaĝon por aŭskulti Esperanton.
Li ĉiu tage enŝutas unu mallongan paroladon (je 3 - 4 minutoj) por aŭskulti el la retpaĝo aŭ por elŝuti (ĝi estas MP3).
Apud la sondokumento aperas la teksto, por ke oni povas legi dum la parolado.

Paroladoj estas sufice malrapidaj kaj facilaj, dankon al tekstoj, por ke gelernantoj profitu ilin.

Li parolas pri ĉion: anatomio, sano, voĵoajoj, Esperanto, Historio, Gadaffi, vivmaniero,...
Vidu la kompletan programliston de la Esperanta Retradio. Roger Springer rspring@tpg.com.au

Jonathan Cooper prelegos en Vjetnamio

Dum la universalaj kongresoj ĉiam okazas fakaj prelegoj kadre de IKU (Internacia Kongresa Universitato). Ĉi-jare en Hanojo unu el la prelegantoj estos Aŭstraliano. Jonathan Cooper prelegos pri moderna arto. Antaŭ ol prelegi en Vjetnamio li ja prelegos **ankaŭ en Sidnejo (la 26an de majo).**

Nicole Else nicole@cryogenic.net

Karaj Amikoj,

Mi ĵus rigardis filmeton pri la hispana Esperanto kongreso kiu okazis antaŭ semajno. Kaj surprizo: je la fino de la filmo, sidneja esperantisto diras ke li ŝategis la kongreson.

http://www.youtube.com/watch?v=FfgfFoG9U68 Nicole Else nicole@cryogenic.net

Daniel salutas nome de la aŭstraliaj esperantistoj

http://www.ipernity.com/doc/pedroesperanto/12620365/in/album/270430

AEA decidis ree malfermi sian forumon, sed nun nur AEA membroj rajtas skribi en gxi. Kial tiu decido? Ĉu la AEA estraro pensas, ke esperantistoj kiuj ne estas membroj de AEA havas nenion interesan por skribi? Ŝajnas al mi, ke se AEA malpermesas al multaj esperantistoj afiŝi la forumo estos apenaŭ uzata kaj do tute malinteresa. http://forumoj.esperanto.org.au/ Nicole Else nicole@cryogenic.net

Aŭstraliaj Esperantistoj havas ĉ 200 legantojn

Sendu viajn komentojn, opiniojn, pensojn, ideojn, demandojn al AE

Sendu viajn lokaj gazetoj per retmesaĝo kaj mi resendos al 200 legantoj

rspring@tpg.com.au

Vortoj de "Lernu" Plenigaĵo de paĝo

ELOKVENTA

1. Posedanta la talenton facile, konvinke kaj bele paroladi:

Li elokvente parolas.

Elokventa advokato.

Sciu elokventi, sciu ankaŭ silenti.

2. Bela kaj konvinka, multon signifanta:

Ŝi rigardis al mi per elokventa rigardo.

Min enuigis lia tro konstanta elokventeco.

La infano elokvente esprimis sin.